


FERVOJA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de TUTMONDA ASOCIO DE LA ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

<p>Jara abono : ₯ 1. Unu N° : ₯ 0,2 Anoncoj : 1 paĝo : ₯ 5 ; 1/2 paĝo : ₯ 3 ; 1/4 paĝo : ₯ 2.</p>	<p>REDAKCIO S-roj George Chilot kaj Givord, 3, r. Richard-Lenoir Paris Administrantaj Redaktoroj Sekretario : S-ro Alfred Petzold Scharnhorststr. 43 I, Leipzig Prezidanto : S-ro P. Tarnow Schwanenweg 18, Kiel, (Germanujo).</p>	<p>Ĉiujn manuskriptojn, abon- mendojn, anoncojn, k. t. p., adresu al S-ro GEORGE CHILOT, en <i>Ville- neuve-St-Georges (Francujo)</i>. La redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la man- uskriptojn. — Artikolojn ne ak- ceptitajn oni ne povas resendi.</p>
---	---	--

Urbo LYON (Francujo).



En tiu urbo, kiu enhavas 524.000 loĝantojn, okazos de Majo ĝis Novembro 1914, granda internacia Ekspozicio.

AL NIAJ LEGANTOJ

« Fervoja Esperantisto » alportas al ĉiuj siaj anoj siajn plej bonajn bondezirojn.

Ĝi estus farinta tion pli frue, se ĉiuj ĝiaj abonantoj estus donintaj al ĝi pli frue monrimedon, sendante sian kotizaĵon tuj post la komenco de la jaro. Ĝi petas amike ĉiujn, kiuj malfruas, sendi la kotizaĵon kiel eble plej baldaŭ al S-ro George Chilot, en Villeneuve-St-Georges, kiu estos al ili tre dankema.

Estas ja necese, se ni deziras, ke nia gazeto aperu regule, ke regule ankaŭ la abonantoj sendu abonprezon.

« Fervoja Esperantisto » devus esti la plej interesa kaj la plej grava gazeto el la esperanta gazetaro, ĉar la fervojistoj estas pli multenombraj, ol la aliaj oficistoj. Ĝi tia fariĝos, se ĉiu abonanto prenas sur sin la taskon varbi almenaŭ unu abonanton. Duobligante sian nombron, la vivo de « F. E. » estus certigata, ne bezonante peti aldonmonon de kamaradoj.

Por faciligi la propagandon, « F. E. » aperos de nun ilustrita per belaj pejzaĝaj bildoj de Francujo, kiuj donos al ĝi efektivan ĉarmon kaj valoron.

Do, al la laboro, kamaradoj, ke ĉiu el ni varbu abonanton, kaj F. E., iĝanta pli kaj pli grava, pli kaj pli interesa, estos la ligilo, kiu unuigas ĉiujn esperantistajn fervojistojn, kaj kiu permesos al ili plenumi sian plej karan deziron: disvastigi Esperanton inter la fervojaj oficistoj.

LA REDAKCIO.

Karaj Kolegoj Fervojistoj!

Esperanto jam staras sur firma bazo, kiel niaj mondkongresoj kaj la progresado de la Esperantomovado ĝin pruvas. Tamen nia Asocio ne sukcesas, ĉar la kamaradoj ne sufiĉe ĝin subtenas. Tiu tre bedaŭrinda stato ne povas daŭri. Mi scias, ke multe da fervojistoj estas tre lertaj kaj oferemaj Esperantistoj, sed ili nur ĝenerale laboras por Esperanto kaj ne por nia

Asocio. Tamen nur la komuna praktika apliko de Esperanto povos iam efektiviĝi nian celon.

Tial ĉiu fervojisto subtenu nian Asocion kaj pagu denove sian kotizon kaj abonprezon.

Kiu ĝis nun ne estas membro, bonvolu turni sin al nia sekretario, S-ro Alfred Petzold en Leipzig, Scharnhorststrasse 43 I. — La abonprezo (1 Sm.) estas sendota al S-ro George Chilot, en Villeneuve-St-Georges (Francujo).

SZYMANOWSKI

Teknika supera Sekretario
Vicprezidanto de la Internacia Asocio
de la Esperantistaj Fervojistoj.

Bromberg, Werderstr. 23 I.

A. BERLANDE

Ĉiuj niaj samideanoj estas antaŭsciigitaj individue de la morto de nia kolego Berlande. Tiu individua avizo estis sendita je la peto de la Esperantista Grupo de Villeneuve-St-Georges, kiu remetis al nia Asocio, por tiu sendo, la restaĵon de la kolekto faritan inter siaj membroj por aĉeto de florkrono al nia bedaŭrata kolego.

Lia vidvino, al kiu ni esprimis en la nomo de nia Asocio niajn funebrajn kondolencojn, adresas siajn dankojn al ĉiuj kamaradoj, kiuj skribis al ŝi okaze de la morto de ŝia kara foririnto.

Berlande naskiĝis en Ivry apud Parizo, en la jaro 1868. Li estis fervojista oficisto de post 1894. Li ripozas nun en Arles, urbo de ŝia vidvino.

La funebra ceremonio okazis en Villeneuve-St-Georges, la 16-an de Januaro.

Tri paroladoj estis eldiritaj ĉe la stacio de Villeneuve-St-Georges, antaŭ la veturigado de la korpo de nia tre bedaŭrata amiko.

Ni citas ĉi tie nur tiun de S-ro Vatan, direktoro de la lernejoj de Villeneuve-St-Georges, en la nomo de la Esperantista Grupo de la urbo.

Per vortoj kortuŝantaj S-ro Vatan memorigis la vivon de nia amiko, kiu batalis de multaj jaroj por Esperanto.

Li memorigis ankaŭ la fondon de nia Asocio, dirante, ke la nomo de nia kamarado restos eterne en la koro de la esperantistaj fervojistoj.

Fine S-ro Vatan, sin turnante rekte al nia mortinta kolego diris :

« Aŭskultu ankoraŭ unu fojon, kara samideano, la vortojn, kiujn vi amis aŭdi :

*En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko.* »

.....

Post lasta adiaŭo al nia amiko, la ĉeestantoj disiris kortuŝate, pensante pri la doloriga perdo de la neforgesebla fondinto de nia Asocio. G.

~~~~~

## Torfa pulvoro por hejtado de lokomotivoj.

(Fino.)

Torfpecojn oni ne povis uzi en pli granda miksaĵo kun ŝtonkarboj ol ĝis 5 0/0. La laboro bezonata por la hejtado per torfa pulvoro estas efektive nula, ĉar ĝi okazas aŭtomate ; pro tio la hejtisto povas direkti sian atenton pli al la observado de la reloj kaj signaloj. Kiam oni uzis torfpecojn, rezultis, ke la laboro de la enŝovelado estis tiel granda, ke oni estis devigita pliigi la hejtistpersonaron. Dum la hejtado per torfa pulvoro oni povas ricevi el la sama lokomotivo la samgrandan efikon pri forto, kiel dum la hejtado per ŝtonkarboj. Dum la hejtado per torfpecoj, la fortetiko de la lokomotivoj estis malplialtiĝinta tiamaniere, ke oni estis devigita pliigi ilian nombron kaj eventuale eĉ konstrui aŭ havigi al si novajn kaldronojn. Por la hejtado per la torfa pulvoro oni ne devas aliformigi la vapor-kaldronojn, sed nur provizi je fajra instalaĵo.



La personaro ne devas suferi iajn malagrablajojn dum la hejtado per torfa pulvoro, kompare al la hejtado per torfpecoj, ĉar la torfa pulvoro moviĝas en fermita kondukilo. Kaŭze de la konstruo de la fajra instalaĵo, malvarma aero ne povas enpenetri en la fajrejon kompare antaŭ ĉio al la hejtado per torfpecoj, sekve de kio oni estis devigita lasi tro longtempe aperta la hejtaperturon.

Ĉar nun per la uzo de torfa pulvoro estas forigitaj tiel de la hejtado per torfpecoj, kiel ankaŭ de tiu per ŝtonkarboj, oni povas esperi, ke la torfaj muskoj kiel brulaĵo por lokomotivoj multe pliboniĝis, se oni uzos tian brulaĵon.

Ĝis tien la paroladoj. Ne cititaj vidiĝas ekonomiaj rilatoj, kiel tiaj estus gravaj, precipe por landoj, kiuj mem posedas karbominejojn kaj por kiuj ne estos necese, ke ili aspiru pri liberiĝo de venigado pri karboj eksterlandaj.

REUSS, el Regensburg.

---

### Milito de la usona registaro kontraŭ la Delawari, Laikawanna & Western R. R.

---

Ni intence diras : « milito » kaj ne « malpaciĝo » aŭ « disputo », ĉar por milito oni ja bezonas soldatojn kaj ĉi tiujn uzas nun la usona registaro, por defendi siajn supozatajn rajtojn kontraŭ la D. L. & W. R. R. Al la dispono de la fervojo nature ne estas armeo, kaj ĉi tial ĝi nun jam estas venkita, sen esti kontraŭstarinta. Tio ja ankaŭ ne estus estinta ebla.

Do : laŭ ordono de la militministerio en Washington aŭ de la « militdepartamento », kiel ĝi nomiĝas, la kompanio B de la 29-a infanteria regimento, kiu estas kazernita en Fort Porter, ekokupis la kajon, la albordiĝejon apud la elfluejo de la Buffalo River, kiu estas uzata de post multaj jaroj de albordiĝboatoj de la nomita fervojo. La trupoj sin aranĝis kvazaŭ hejme, konstruis tendojn kaj anoncis, ke ili malhelpos ĉiun pluan albordiĝon de boato, se necese per forto de la armiloj. Ili tiel longe restos sur la kajo, ĝis la afero estos tute ordigita kaj ili ricevos la ordon de el Washington, reiri al la kazerno. Agiĝas



ĉe tio ne pri tre multekosta objekto, nur pri ne longa riverbordo de larĝeco de ĉirkaŭe 15 futoj, kiun la registaro pretendas kiel sia propraĵo, dum la fervojo neas la *proprec-rajton*. La militsekretario Stimson estis ordoninta ĉi tiun militistan agadon laŭ postulo de la ĉefadvokato Wickersham, ĉar la ĉefadvokato laŭdire pruvis nekontraŭdireble, ke la malgranda bordstrio efektive estis tero de la registaro kaj senrajte estis okupita de la fervojo.

La situacio estas la jena: La usona registaro estis posedinta la posedrajton al tiu ĉi terstrio, sed ne estis multe zorginta pri ĝi. Kiam la fervojo estis konstruata kaj oni serĉis por la boatoj albordiĝejon, oni agis laŭ bona antikva « Squatter »-maniero kaj okupis nur la teron, ne demandante kaj ne zorgante pri la posedstatoj. Post tio pasis dek jaroj kaj kiam pli poste tamen ekfariĝis pli granda ordo en la terposedstatoj de Usono, kaj la registaro postulis de la fervojo la redonon de la terstrio, tiu ĉi kontraŭdiris, ke ĝi siatempe en bona kredo okupis ĝin kaj ke ĝi posedas ĝin *unue* sen kontraŭdirite jam dum 50 jaroj. Per tio ĝi estus akirinta la posedrajton. Jam en la jaro 1910, la usona registaro dekretis, malpermesante al la fervojo plue albordigi en tiu loko siajn ŝipojn. Tiam la fervojo ŝajnas esti farinta juristan malĝustaĵon, ĉar ĝi petis la registaron pri plilongigo de la limtempo kaj per tio ŝajnas esti konfesinta la posedrajton de la ŝtato. La registaro konsentis la limtempon ĝis Decembro 1912. Kiam ĝi pasis kaj la fervojo ne estis *cedonta* de la terstrio, sed estis efektivigonta la posedrajton per la « sidado » akiritan, la ĉefadvokato neeble komencis procesadi, sed igis la militministron forprenigi la teron de la fervojo per armilforto, permesante al la fervojo nun procesi kontraŭ la registaro.

La haveno nome devas esti plibonigata kaj la registaro volas uzi la albordiĝejon, por tie albordigi la materialon kaj la necesajn ilojn. Estis ankaŭ farita la riproĉo, ke la vaporŝipoj de la fervojasocio malhelpis kaj malakcelis la ŝiptrafikon. Momente la asocio estas serĉanta alian provizoran albordiĝlokon, ĝis la juĝejoj estos dirintaj la lastan verdikton.

*Esperantigis* : KOMO (el Danzig).

---



## Berna Internacia Kontrakto pri la Fervojaj transportaĵoj (Sekvo).

---

*i)* La rimarkon pri afranko, okaze de la antaŭpago de transporta pago aŭ okaze de la depono de la antaŭpago pri la afranko. (Artikolo XII-a, alineo 3-a.)

*k)* La pagoŝarĝojn, kiuj estas pagotaj por la komercaĵo, nome tiel la pagotajn nur post la alveno de la komercaĵo, kiel ankaŭ la antaŭpagojn kontantajn pagitajn de la fervoja administracio. (Artikolo XIII-a.)

*l)* La citon de la irota transportvojo per diroj de la stacioj, kie devas okazi la dogana prilaborado aŭ eventuala polica ekzameno.

Se ĉi tiuj citoj mankas, la fervoja administracio devas elekti tiun vojon, kiu ŝajnas esti plej praktika por la forsendinto. La fervoja administracio estas nur garantideva rilate al la konsekvencoj de ĉi tiu elekto, se ĝi tiurilate faris grandegan eraron.

Se la forsendonto citis la transportvojon, la fervoja administracio nur rajtas uzi alian vojon por la transportado de la sendaĵoj sub la jenaj kondiĉoj :

1) Ke la dogana- kaj impostofica ekspedado aŭ eventuala polica ekzameno okazos en la stacioj cititaj de la forsendinto.

2) Ke ne estos postulata pli alta transporta pago ol tiu, kiu estus estinta pagota, se la fervoja administracio estus uzinta la vojon cititan en la ŝarĝatesto.

3) Ke la limtempo por la livero ne estos pli longdaŭra, ol ĝi estus estinta, se oni estus transportinta la sendaĵon sur la vojo citita en la ŝarĝatesto.

Se la forsendstacio elektis alian transportvojon, ĝi devas komuniki tion al la forsendinto.

*m)* La subskribon de la forsendanto per lia nomo aŭ lia firmo, kaj la diron de lia loĝejo. La subskribo estas anstataŭebla per presita aŭ stampita signo de la forsendanto, se la leĝoj aŭ regularoj de la forsendstacio tion permesas.

---

(Daŭrigota.)



## BIBLIOGRAFIO

**Lernolibro** de la plej simpla kaj plej facila Esperanta Stenografio, de Ludoviko Jakab (ano de I. A. E. F.), — Prezo 20 sd.

**Tra la loko ensorĉita**, novelo originale verkita en Esperanto de pastro Joh. Ŝirjaev. Prezo 0 Sm. 030.

Malĝoja historio, leginda tuj post vekigo.

**La Premiito**, novelo originale verkita en Esperanto de Herschel S. Hall. — Prezo 0 Sm. 050.

Patrino amo kaj Esperanto naskis tiun historion, kies legado igos plori ĉiujn legintojn.

**Rusa lernolibro** por Esperanto, de A. A. Saharov.

Haveblaj ĉe Librejo Esperanto, Moskvo (Ruslando), kaj ĉe Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

---

### KOMBISTO POR GESINJOROJ

*Specialeco de Harkapornamoj*

**HECTOR LEDOUX, 12, rue St-Placide, Paris**

Apud de magazenoj AU BON MARCHÉ

---

Hotelo rekomendinda al Esperantistoj.

### GRAND HOTEL DU GLOBE

71, rue Monge, Paris

---

### LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRITA REVUO

Ĉiu abonanto de la jaro 1914, krom 12 n-roj de l'gazeto, — ricevos *donace* belan Esper. libron :

**Esperanta Poŝkalendaro por la jaro 1915.**

La abonpagon (2 rubl.=2, 120 Sm.) oni sendu al Librejo « Esperanto » (Moskvo, Lubjanskij projezd, 3, Ruslando).

---

Centra Presejo Esperantista, V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

*Le gérant : GIVORD.*